Laŭzana Esperanto-Societo
Januaro 2022 - n-ro 1

# Laŭzana informilo

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

## *Venontaj kunsidoj:*

- Ma, la 1an de februaro *Ĝenerala asembleo*
- Ma, la 1an de marto *Decidota*
- Ma, la 5an de aprilo *Decidota*
- Ma, la 3an de majo *Decidota*

**Marde, la 11an de januaro 2022 je la 20-a**
**ni kunsidos en Espace Dickens en Laŭzano … se eblos.**
**Ni interparolos pri malfacilaĵoj kaj problemoj de nia kara lingvo**

### Memoraĵo de la *Zamenhofa Festo* en Espace Dickens



**Mankas en la foto: Knud, David, Claude, Gilbert kaj la fotisto Patrick el Belgio.**


## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com …*esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2021-2022**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

### Grava ŝanĝo de kutimo

Jam de kelkaj semajnoj la tri salonoj en Espace Dickens estas rezervitaj por ĉiuj unuaj lundoj de 2022. Ni do devas ŝanĝi niajn kutimojn aŭ ŝanĝi nian kunsidan lokon.

Tre amikeme Knud kaj Marie-Antoinette donacus sian salonon por helpi. Ni dankegas ilin, tamen ni devas pensi reorganizi *Babiladajn Rondojn* ankaŭ en Montreux, do sufiĉos.

Tiel la sekretario proponis al la membraro sindecidi pri 3 eblecoj por la tuta jaro 2022:

1 elekti la unuan mardon de la monato

2 elekti la duan lundon de la monato

3 serĉi alian lokon por konservi la unuan lundon

La opinisondo donas pli-multon al la elekto no 1. Ni do kunvenos ĉiujn unuan mardon de la monato.

**Notu bone: la 1ª de februaro, la 1ª de marto, la 5ª de aprilo kaj la 3ª de majo.**

**Poste: la 6ª de septembro, la 4ª de oktobro kaj la 1ª de novembro.**

La sekretario

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio C, parto 3*





Ni petis al la loĝantoj de la *Internacia Stacio Spaca,* ĉu ili povas pruntedoni lokon al LES por kunsidi. Ne eblas !!!

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | 1 | 7 | 2 | | | 5 | |
| 7 | 3 | | | | | | 9 | |
| | | 6 | 4 | | | 3 | | 7 |
| | | | 5 | | 9 | 6 | | 3 |
| 3 | | | | | | | | 1 |
| 1 | | 8 | 6 | | 7 | | | |
| 2 | | 7 | | | 5 | 1 | | |
| | 1 | | | | | | 2 | 5 |
| | 4 | | | 6 | 1 | 7 | | |

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | X | | | | X | | X |
| X | X | | | | | | X |
| | | | | | | | |
| | | | | | X | | |
| X | X | | X | | | | |
| | | O | | | O | | |
| X | | | X | | | | |
| | | | O | | | | |

Plenigu la kradon skribante X kaj O tiel : Ne pli ol 2 X kaj O sekvantaj en la linio aŭ en la kolumno. Tiom da X kaj O en la linio kaj la kolumno. Neniu linio aŭ neniu kolumno estas identa.

Solvoj



La ĉefkuiristo alproksimiĝas de nia tablo: *«Ĉu enordas kaj ĉu la menuo plaĉis al vi? Mi volonte proponas al vi digestigaĵon lokan ... »* Niaj geamikoj volas testi ĝin sed mia edzino kaj mi mendas nur kafon. Unu el la plonĝistoj intervenas: *«Demandu al li, ĉu nia historio tute veras aŭ ne?»* La kuiristo komencas: *«Jes veras. Ses monatoj antaŭe, mi mem estis atestanto pri io bizara, kiam fine de mia laboro mi ŝlosis la kuirejon … en nigra nokto ... mi rimarkis blankan formon homan, kiu surakve, tute senbrue, moviĝis al la direkto de la kastelo. Bloveto freŝigis mian dorson. La "Blanka Damo" altigis sin ĝis la tria etaĝo kaj tramuren malaperis. Nur restis kelksekunde blua flamo malantaŭ ŝi. Mi certigas, ke estas la vero. Cetere mi konas personojn, kiuj vidis la saman strangaĵon.»*

Rehejmeniĝante Klara anoncas: *«Pli kaj pli tiu aferego interesas min. Mi absolute volas verki libron pri la mistero de la "Blanka Damo". Morgaŭ ni povus enketi renkontante la kastelanon.»* Luko respondas: *«Tro danĝeras. Ĉu vi aŭdis, ke la frato freneziĝis?».* Mia edzino rifuzas iri. Klara estas tute decidita kaj argumentas, ke kiel ĵurnalistino ŝi iafoje bezonas riski por trovi solvon.

Sekvatage ni tri ĉeestas proksime de la kastelo. Luko ekdiras: *«Jes ĝi aperas sur la foto de mia onklo.»* Ni sonorigas ĉe la pordego de la kastelo. Ĉefservisto venas malfermi ĝin demandante: *«Kion mi povas fari por vi?» Tuj Klara respondas: «Saluton. Mi estas kanada ĵurnalisto», montrante sian profesian karton. «Mi enketas pri la historio de kasteloj svisaj de tiu regiono. Mi deziras intervjui la Kastelestron».*

La ĉefservisto anoncas, ke lia Mastro ne ĉeestas tiumomente kaj proponas al ni reveni morgaŭ. Klara dankas kaj ni foriras, salutante lin. Ŝi havas alian ideon: *«Ni devus lui ĉambrojn en la restoracio-hotelo kaj observi, ĉu okazos io dumnokte.»* Ĉiuj el ni konsentas. Mi telefone informas mian edzinon.

Je la noktomezo Luko, kiu de duonhoro observas trafenestre, krias al ni: *«Venu, mi ekvidas ion.»* Surakve ni povas vidi lumon, kiu alproksimiĝas al la bordo. Tuj ni decidas eksteriri senbrue por pli bone observi. Ni kaŝas nin malantaŭ arbojn kaj vidas la lumon bluan preskaŭ kiel junulinan formon. Ĉu estas nia imago, kiu kreas bildon de la "Blanka Damo"? La aperaĵo moviĝas, aliras malrapide kaj ondante, ĉirkaŭita de blua lumo. Ni kaŝe sekvas ĝin.

Ĝi aŭ ŝi flugas super la strando kaj alvenas pli kaj pli al la kastela haveneto. Subite el la kontraŭa flanko de la konstruaĵo aperas du aliaj similaj formoj, proksimiĝantaj al la "Blanka Damo". La tri restas tiel grupe kelksekunde antaŭ trairi la kastelmuron je la dua etaĝo kaj malaperas. Ni atendas momentege ... silente esperante ankoraŭ ion ... sensukcese. Ni tre kviete revenas al nia hotelo sen paroli.

# Intervjuo de Cédric BORNAND, membro de LES



(Fare de Francisko)

*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis en 1964 en Sainte-Croix. Miaj gepatroj (puraj jurasaj Loĝantoj, kiuj oni nomas loke « Sainte-Crix ») laboris ĉe Paillard kaj Bolex. Mi mem studis en Yverdon ĉe la latina gimnasio antaŭ iri al EPFL en la elektra fako. Nun mi profesoras en la *Ingeniera Lernejo* de Yverdon.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Kiam mi 8jaraĝis mia patrino Janet – membro longtempe de LES – sekvis korespondan kurson. Do por mi esperanto akompanas mian vivon delonge.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Mi atendis patri du infanojn – Leonore kaj Romeo – por partopreni kun ili, dum niaj ferioj en Bretonio, instruadon ankaŭ kune kun mia patrino.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Miaj amikoj – ne sciante, ke mia patrino estas esperantisto – pensas, ke mi tute falis en sekton.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Neniu. Mia edzino neniam interesiĝis al la internacia lingvo.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Kun mia patrino kaj miaj du geadoleskantoj mi partoprenis la UK-on en 2009 en Bjalistoko (Polonio). Mi ĵus deziras aldoni, ke mi plezurege ĉeestis dum la filmado de *"La Sekreta Vilageto"*, kies la heroo estis mia filo Romeo.**